Universala Esperanto-Asocio

BUNTA TEMARO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2016-29 sendita el Budapeŝto, la 19an de oktobro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj.

## Revuo *Esperanto* – kio okazas?

La estraro venis al la punkto decidi en sia skajpa kunsido de la 15a de oktobro , ke iu estrarano devos respondeci pri la oficiala organo de la Asocio. La vic-prezidanto prenas tiun rolon, kaj petas provizore al ĉiu kiu volas rilati kun la revuo sendi siajn mesaĝojn ne nur al la oficiala revua adreso <redakcio<ĉe>revuoesperanto. org> sed kopie al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Materialo por la oktobra revuo estas en aktiva kolektado kaj pretigo, la septembra proksimas al presejo. Pliaj artikoloj ege bonvenas! Dezirindas ne nur stratosfere viziaj temoj – ni volas ekscii, kio okazas inter averaĝaj esperantistoj en kluboj, aranĝoj kaj iniciatoj. Eluzu la revuon por konigi viajn ideojn, agojn kaj projektojn!

## Ni ne tuj forgesu pri UK Nitra!

Plurrilate, la pasinta UK estis signifa. Pleje rimarkinda estas la pozitivaj ligoj inter unu UK kaj la sekva. Esti LKKano ne estas inter la pli facilaj defioj de la mondo - kial ni perdu la okazon transigi spertojn kaj konsilojn de unu LKK al la sekva? Jen plia raporto pri unu el la koreaj grupoj, kiuj iris al Nitra por partopreni kaj arigi spertojn:
http://blog.naver.com/sokoguryo/220810511835

Kontribuis: SO Gilsu el Koreio.

## La 50a Kongreso de ILEI – gravega evento





En la paĝo de ILEI www.ilei.info aperas bazaj informoj pri la Kongreso kun fotoj kaj informoj pri la urbo Busano en la suda parto de Koreio. La kongreso okazos en julio en la semajno antaŭ la UK. Eblas trovi informojn pri la Kongreso en *Facebook:*

https://www.facebook.com/groups/158807324552503/?fref=ts

## Poznano ludas esencan rolon en niaj strategioj

Raporto pri la septembra interlingvistika sesio: http://edukado.net/novajhoj?id=647
Intervjuo de Ilona Koutny pri la interlingvistikaj studoj:
https://www.youtube.com/watch?v=5LHLDgwNi5c

## La Eŭropa Tago de Lingvoj festita en Hungario

Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) aliĝis al la programo de la Landa Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj. Johano Nagy, la vicprezidanto de HEA salutis kaj malfermis la aranĝaĵon kun la titolo: "La spertoj de la plurlingva tradukanto." Laŭ verkaĵo de D-ro Endre Dudich prelegis S-ino Mária Eszes, la prezidanto de Arta Rondo en la urbo Pécs. La programon kolorigis S-ro Jozefo Horváth, la altnivela arttradukisto, kiu prezentis sian tradukitan libron de la fama hungara verkisto Zsigmond Móricz, "Estu bona ĝismorte".

## Paco tra la mondo – kerna celo por UEA

S-ro Jasuo Hori eldonis libron titolitan “Pacmesaĝoj tra la mondo”. Vidu la alkroĉitan informon.
Li skribas: “Dum UK-oj kaj en la Azia Kongreso kaj pere de la Delegita Reto, mi kolektis 166 pacajn mesaĝojn el 56 landoj. Mi faris libron pri tiuj mesaĝoj kun belaj fotoj. Dankante al la mesaĝdonintoj mi atendas viajn mendojn”.

HORI Jasuo, JP-71-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3. hori-zonto@water.sannet.ne.jp




## Valora kontribuo pri praktika pac-konstruado

La prezidanto de ILEI tradukis la prelegon de belga eks-ministro, eks-prezidanto de Kuracistoj sen Limoj, S-ro Reginald Moreels. Li faris tiun pensprovokan prelegon en Oostende okaze de la 48a ILEI-Konferenco en 2015. La teksto aperis en la organo de ILEI, *Internacia Pedagogia Revuo*, numero 2015/3. Vi trovos la tekston sur la retejo de nia faka asocio pri naturprotektado (AVE): verduloj.org



## Ekspozicio kaj Seminario en urbo kun longa E-historio

Galaco (Galati=Galatz) estas la unua urbo en Rumanio kie estiĝis esperantista grupo 'Unua Rumana Societo Esperantista' en 1904. Laŭ iniciativo de Doru Neagu, muzeografo de la Historia Distrikta Muzeo Olt, la Galac-Distrikta Muzeo decidis, ke ekspozicio kaj seminario okazos en la 21a de oktobro, 2016. La ekspozicio nomiĝas: "El la historio de l'esperantista movado inter-nacie, nacie kaj loke"; la seminario havas similan temon. UEA sendis salutleteron al la aranĝo.

Laŭ teksto de Marian Vochin, la vicdelegito de UEA en Bukareŝto.

*Transŝovitaj al EKO 30 aŭ poste: UEA aktiva en korea konferenco de kongres-organizantoj; vojaĝkonsiloj por pensiuloj kaj oraĝuloj, Ĝemelaj urboj, VojotroV: kiel ricevi de la Libroservo de UEA regulajn perretajn informojn pri nove aperintaj titoloj.*

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Vortoj: 735

EKO 2016-29 Okt 17 diversa.docx